2-a Jaro, N-o 36 (88)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

3. Junio 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio)

Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

ĈU EŬROPO PEREAS?

Lastatempe ni ofte aŭdas pri pereo de Eŭropo. Ambaŭflanke ni aŭdas ĉi vekriojn. Ĉu pravas politikuloj kaj publicistoj frapante en la alarmsonorilojn?...

La plej famaj ekonomiistoj kaj burĝaj politikistoj, la plej famaj kapitalistoj kun anglaj dekstruloj je fronto laŭte krias: "Eŭropo pereas!" "Eŭropo alproksimiĝas senĉese al ruino!"

Vidante, ke Eŭropo senĉese alproksimiĝas al ruino, la kapitalista inteligentularo trovas tamen savtabulon en formo de konferencoj senarmigaj, internaciaj, ekonomiaj, en formo de ĝeneralaj konceptoj, kiel Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo ktp.

Logikaj konkludoj ĉe falsaj premisoj.

Estas tre malfacile polemiki pri tio, ke Eŭropo pli kaj pli alproksimiĝas al ruino.

Sed kia Eŭropo?

Tute kompreneble: Eŭropo hodiaŭa!!

La kapitalismo suferas sklerozon. Krevas ĉiufoje alia sangvazo, alia vejno ora, paralizante jen tiun ĉi, jen alian organon. Tia ĝenerala paralizo nomiĝas la krizo.

Tiaj krizoj ĉiam ekzistis ĉe nuntempa sociordo, sed estis mallongdaŭraj. Tute aliel prezentiĝas la afero nun. La krizo estiĝis kronika.

Same kiel al agonianto ŝajnas, ke kun li pereas tuta mondo, tiel al la agonianta kapitalistaro ŝajnas, ke Eŭropo pereas!

Ne Eŭropo pereas, sed pereas en Eŭropo la kapitalismo, kiu penadas defendi sin de pereo.

Dronanto kaptas razilon por savi sin. Burĝaj politikistoj kaj ekonomiistoj, homoj tute ne stultaj, perdas ĉe finiĝo de sia regado kapojn, kreante la plej malsaĝajn konceptojn de packunvivado de Eŭropo kaj elkonduko de ĝi el nuna, katastrofa situacio ekonomia.

Inter la serĉantoj de savo sole Mussolini efektive trovis rimedon por kapitalista Italio.

Estus nedubeble, ke, se faŝismo venkus, eĉ tra tuta mondo, ĝi certe estus "ordigita" komenco de fin-fina socirenverso.

Ĉar la faktoroj, kiuj ĝis nun kaŭzis ekonomiajn militojn, entute ne ŝanĝiĝus.

Ĉiuokaze oni devas konfesi, ke la faŝistaro en Italio apartiĝis per ĉina muro de socialist-demokrataj elementoj, kreis sian fronton kaj venkis. Tiamaniere ili fariĝis por iu tempo herooj "naciaj", alivorte, ili savis la kapitalismon en Italio. Sed ne por ĉiam.

La kapitalistoj de aliaj landoj ne timas pri Eŭropo, sed pri ĉeso de sia regado kaj tio ĉi ne povas nin interesi. Ni ĝoju, ke fine alproksimiĝas ĉi delonge jam atendata momento.

H. H-rn. L.

La najbareco de homo kaj maŝino

La naturtransformigo laŭ ekonomivaro okazas per kunigita laboro de homo kaj maŝino. Ĉu la estanta kunlaboro estas akorda?

La maŝino estas inteligenta, implikita ilarplibonigo de l' homo. Energion kaj materialon ĝi regas per ega forto. La forto de la eta fingro povas efikigi ĉe ĝi plej grandan fortdisvolvon kaj produktigi varojn amase. La prozo de la radsusurado forigis la poezion de la metiista vivo.

Najlforĝisto dum 8 horoj forĝas 400 bretnajlojn. Duobla najlmaŝino dum la sama tempo 96000 najlojn. Vitroblovisto produktas dum 8 horoj 175 botelojn. Vitroblovmaŝino dum la sama tempo 5000 botelojn.

Amasprodukto estas ĝia prefero, simpleco ĝia malprofito. La labordisigo, partigo estas finfine per ĝi destinita. Ĝi nur povas produkti partojn de la tuto, la produktataj labor"pecoj" preskaŭ ĉiuj estas precizaj milimetre. La supereco de la maŝino pri la homa laborkapablo kuŝas en ĝia pli preciza, rapida, fortplena, neniam laciĝa laborkapablo kaj -livero. Ĉar la homo ne plu povas sekvi, tial la laboro estas ŝirata el ĝia formiganta mano. Diversformigeblecon ne plu havas laboristo. Hodiaŭ ĉiu laboro ankoraŭ ne estas entute regulita maŝine, sed tamen la ekonomia estonteco apartenas al la maŝino.

Estante la homo nur havas la taskon, funkciigi mekanike la maŝinon, laborpecojn firmtreni, ekhaltigi maŝinon kaj tion daŭre sin reiĝanta, sub formo laŭ minutaj frakcioj kalkulita kaj kontrolita. La plej multaj laboristoj estas malkutimigitaj per tio de propra pensmaniero. Servistoj ili estas. La personeco sufokita, kiel persono li ne povas montri sin en mekanika laborejo. Li nur anstataŭas funkciigilon per certaj samaj agoj. La maŝino funkcias ĉiam laŭ propra irado, nur kelkfoje interrompata por postulo de purigado kaj oleizado. La homo iĝas, kontraŭ ĝia eco kiel organa vivestaĵo, maŝinparto.

La agado de la laborhomo monotoniĝas per tia funkciigreiĝo. Malgraŭ tio estas postulata la plej ega atentemo. La varo povus esti fuŝa, la maŝino difektata kaj akcidentdanĝero pli granda. La troŝarĝigo de la homo per monotoneco igas enuon, per atentemo laciĝon. Ambaŭ efikas kune netolereblan malagrablon, labormalĝojon, due tro fruan konstitucian elĉerpon de la korpstato aŭ almenaŭ de gravaj organsistemoj. Dum longa labortempo tio efikas kiel diabla sinmalutiligo kaj kondukas konsekvence al sinmortigo.

La cent samaj ĉiutagaj manmovoj okupas ankaŭ centfoje nur la samajn, neniam aliajn

muskolojn kaj nervojn. De tempo al tempo ili ne plu reformiĝas. La ripoztempo de labortago al labortago estas tro nesufiĉa. Etaj laciĝsimptomoj restas, kiuj dum jaroj ekigas eluzon aŭ labormalkapablon. Jam ofte tre rapide malpliiĝas la laborkapablo ĉe homo ne pli ol kvardekjara. La statistikoj pri metimalsanoj de fabriklaboristoj pruvas la efikon de la moderna laborsistemo.

La kapitalista profitemo lasas formi la maŝinon sen konsidero de la pli delikataj psikaj ecoj de ĝia servanto, la laboristo. Unue la ora "perlodanielo" de la entreprenisto, t. e. la komerca kalkulado. Senanima matematiko kaj naturscienco konstruas tiam la maŝinaron. Aliaj vidpunktoj estas rifuzataj pro neprofito kaj superflueco. La "servanto" devas alkutimiĝi la konstruktivan specon. La ritmo homo frakasiĝas. La monotona funkcio maŝina malebligas ritmigon de la laboro.

Al tia ritmoproblemo ne demandas unu el la entreprenistoj aŭ teknikistoj. Kalkulanta profitemo postulas fizikan — mekanikan — matematikan minimumon de vojtempo sen iu variebleco. Kompreneble estas, se laboristo ĉiam estas kolera kontraŭ siaj ĉiutagaj devoj. La troega postulo al libertempo kaj ĝian uzon laŭ sensacia malfundeco (kinomatografo, alkoholo, nikotino) trovas bonan kampon. De la labortravivaĵo ni venis al la laborsklaviĝo.

Ankoraŭ ion pri la libera metielekto. Leĝe ĝi estas libera. Neniu estas devigata fariĝi laboristo, inĝeniero, tajloro, serurnisto, stratpurigisto, uzindirektoro ktp. Kiel socialistoj ni scias tre bone pri tiu ŝajna metilibereco. La aparteneco al certa sociklaso estas la nenotita leĝdevigo por la metielekto. Kiu estas naskita kiel filo de fabrik- aŭ bienposedanto, povas elekti pli "bonan" metion, ol filo de laboristo. Antaŭ ĉio pro tio, ĉar posedaĵo signifas kleriĝmonopolo. La estanta klasstrukturo do malebligas laŭ posedo justan metidisdonon. La psikologiaj ekzamenmetodoj, kiuj rilate al la ekonomievoluo estas nesufiĉaj, restos nur onaĵoj.

Ĉiuj tiuj efikoj de la kapitalismo fortigas ege la deformacion de la kapitalista mekanikigo kaj la laborregulon. La spirito de la amerikanismo ne povas solvi la kontraŭecon inter homo kaj maŝino.

H. Sch.

Pactraktado inter Riff-anoj, Francoj kaj Hispanoj

Laŭ noto de la hispana "Oficejo Ĝenerala de Maroko kaj Kolonioj" la proponoj de franc-hispanaj "protektantoj" estas:

1. Submetiĝo al la moŝto la Sultano.
2. Malaperigi Abd-el-Krim-on.
3. Malarmigi la kabilojn (nordafrikaj gentoj), kiuj ricevas garantiojn diskutendajn.
4. Interŝanĝo de kaptitoj; diskutenda.
5. *Finigo de la luktado kaj permeso al soldataro hispan-franca unuiĝi ĉe rivero Kert.*

Burĝa ĵurnalaro skribaĉas kontraŭ la delegacio rifana, kiu, laŭ *skribistoj*, malbonintence agas, ke ĝi estas fanatika, malkomprenema, barbara, perfida ktp.

La maŭroj konsentis ŝarĝi malsanegulojn, virinojn, vunditojn en danĝero, infanojn, kiuj estas internigitaj ĉe l' Riff. Oni ankaŭ akceptis la alsendon de medicino, leteroj kaj nutraĵoj al kaptitoj.

La intertraktado okazis ĉe *Camps-Vertoux, Ajun* kaj *Uŝda*. La komenco estis la 18. Aprilon kaj la fino la 1. Majon je la 11 horo matene.

La rifana delegacio konsentis je la spirita (religia) povo de l' Sultano, sed neniam ĝi akceptos regadon de aĉetita Sultano je la ordonoj de franc-hispanoj, ĉar estas nekunigeblaj la konceptoj ĉielaj kaj la mondaj; sekve la misio de Sultano nur povas esti religia, sed neniam monda (la Sultano estas 16 jara!). La delegacio malakceptas la kalifan regadon nek ĝian atentemon, je la terzono hispana en la internaj aferoj de Riff. Ankaŭ malakceptas la intervenon zorgan flanke de la aŭtoritatoj de l' "Protektantoj" (Francio kaj Hispanio).

Kaj ke neniam oni pensu pri la forigo de Abd-el-Krim. Ke la interesoj estas tiom malsamaj . . . Ankaŭ oni energiege opozicios pri enigado de trupoj hispanaj kaj francaj ĉe la respubliko rifana.

La delegacio akceptas jenan aŭtonomion administrativan; "Reĝimo ne permesas iun ajn intervenon flanke de la kalifa aŭtoritato (infano 16jaraĝa je manoj de francoj kaj hispanoj, ĉefe lastaj) aŭ de la "potencoj protektantaj"[1]), en la aferojn internajn de Maroko".

Ankaŭ aludis pri ŝanĝo de la internaciaj traktatoj pri l' Riff.

"Kun granda sento la delegacioj franca kaj hispana konstatas, ke ĝis nun ne estis eble decidigi la delegitojn rifanajn pri akcepto de la kondiĉoj kaj garantioj de paco, **kiuj estas tre prudentaj**, konforme la traktatoj internaciaj." Tio estis komunikata post la eventuala fino de l' pactraktato.

La delegacio iris aŭ reiris al aŭ de sia Rifujo, ĉu aeroplane, ĉu militŝipe, transportitaj de la "Protektantoj".

Nur mi povas diri, ke tie kapitalismo ne venkos. La forto milita de rifanoj estas sufiĉe potenca kaj kuraĝa por kanonpuŝi la banditismon eŭropan. La rifanoj havas abunde pafilojn kaj pafilegojn, aeroplanojn, boatojn vaporajn, inĝenierojn, teknikistojn ĉiaspecajn, kuracistojn, monon, sennombra nombro da radistacioj, ĉu riceva, ĉu disaŭdiga.

Rifanoj venkos, pli aŭ malpli frue; sed **ili venkos!** *Labkoresp.*

[1]) Hispanio kaj Francio.

Nur revolucio proleta finos la militon ĉe l' Riff

La plej multo da hispanoj ofte manifestis kontraŭ la milito maroka. En ĵurnaloj, en mitingoj, per manifestadoj, dum popolaj indignegoj kiel en jaro 1909, ili postulis la forlason de Maroko.

Tamen la milito daŭris, daŭras kaj daŭros, dum la laboristoj ne uzos radikalan kuracilon. Marokon oni ne forlasis, nek oni ĝin forlasas, ĉar la kapitalismo, la reĝo, la militistoj kaj Anglio estas forte interesataj, ke milito daŭru. La hispana kapitalismo sentas grandan bezonon pro la kolonioj perditaj. Por satigi sin necesas la afrikaj kolonioj. La kolonioj alportas grandajn avantaĝojn al kapitalismo. Unuflanke ĝi havas fontojn da materialoj por industrio por tre malaltaj kostoj, ĉar indiĝenoj, malkleraj kaj mallumigataj, laboras longajn tagojn por malaltegaj salajroj. Aliflanke kaj dank' al tarifregularo, la kolonioj estas bonegaj merkatoj por enigi malbonajn produktaĵojn je altaj prezoj. La kolonioj por kapitalismo estas popoloj da sklavoj, kiujn ĝi ekspluatas krime. La hispana kapitalismo deziras ankaŭ la militon marokan, por pravigi la ekzistadon de granda armeo kaj ĝin uzi kontraŭ laboristoj je la momento, kiam siaj privilegioj danĝeras.

Laŭ konataĵoj publikigitaj de la "Ligo de Nacioj" Hispanio jam de longe elspezas pojare pli ol mil milionojn da pesetoj. Sen la milita preteksto oni ne povus pravigi la malŝparadon de tiom gravega riĉaĵo. Laŭ publikigo de personoj bone sciantaj pri la reĝo, li deziras konkiri grandajn regionojn en Afriko, konkiri Portugalion kaj fariĝi imperiestro.

En Hispanio estas pli ol 750 generaloj kaj pli ol 25 000 estroj kaj oficiroj. Kiel pravigi tiom da parazitoj sen iu serioza milito? Kaj, kiel pravigi ankaŭ la rapidajn rangaltigojn kaj la abundajn ordenojn portatajn de pensiitoj de la militistaj kamariljoj favorataj de la reĝo sen ia grava milito? La angla imperialismo ankaŭ ligas Hispanion al la ŝtonegamasoj de Riff. La Mediterraneo estas la vojo de ĝiaj plej riĉaj kolonioj. Al ĝi konvenas, ke ĉi vojo estu ĉiam senobstakla. Se Nordafriko estus en la francaj manoj, Germanio aŭ alia potenca nacio, okaze de milito, per kelkaj submaraj ŝipetoj kaj kelkaj vaporaj distribuantaj eksplodiloj subakve, malpermesus trapasi iun ŝipon merkantilan (komerca). Pro tio imperialismo angla deziras, ke Hispanio daŭrigu, malforta nacio, la "posedadon". Pro tio "The Times" defendas la *rajtojn hispanajn*, t. e. la interesojn de la angla imperialismo. Chamberlajn tiom priokupiĝas pri la afero, atakante la pretendojn, pri Norda Ameriko, de kelkaj nacioj. La milito maroka daŭras kaj daŭros, nenia paco estiĝos, ĝis kiam proleta revolucio triumfos. Tiam ni ĝin finos.

For la rifana milito!!

El Hispanio

Nia hispana k-do, D-ro Fernando de los Rios, profesoro de juro de la universitato Granada, okaze de la ekziligo de alia profesoro en la Madrid'a universitato (s-ro Jimenez Asúa), sendis al la Diktatoro gravan dokumenton, el kiu ni eltiras sekvantan paragrafon:

"La decido eksterleĝa kaj sekve arbitra, alprenita de via moŝto kontraŭ la klera profesoro de la Centra Universitato en Madrido, s-ro L. Jimenez Asúa, decido kiu laŭ la hispanaj leĝoj korespondas parte al la tribunaloj kaj parte al la universitato mem, min instigas, ripeti antaŭ via moŝto la proteston, kiun mi pro sama kaŭzo devis formuli kiel civitano dum Febr. 1924 en la kazo de l' neforgesebla majstro Miguel de Unamuno. Malfacile povas silenti antaŭ la perforto kontraŭ la juro tiu, kiu dediĉas sian vivon por eme kaj profesie laŭde disvastigi la respekton al ĝi ŝuldatan . . .

Pro la diritaj kaŭzoj, via moŝto, la subskribinto renovigas sian proteston firman, serenan kaj decidan kontraŭ la obstina perfortigo al la leĝigeco kaj solidarigas sin kun ĉiuj viktimoj de tia procedo, simbolitaj hodiaŭ en la persono de l' vere glora profesoro Don Luis Jimenez Asúa."

Granada, la 3. Majo 1926.

Fernando de Los Rios

Oni konas ankaŭ el privataj informoj (vi scias, ke en Hispanio la cenzuro estas tre severa) la kuraĝan proteston de l' Ateneo, libera centro de la hispana intelektularo. Tiu dokumento entenas viglan peton pri libereco por la penso kaj por la vivo publika kaj protestas pro la kontraŭleĝa agado de la Diktatoro kaj ekziligo de l' profesoro Asúa.

Nun, sekve, al la unuaj solaj protestoj de la laboristaro kontraŭ la hontiga diktatoreco kuniĝas tiuj de la intelektuloj, kaj Primo de Rivera vidos baldaŭ, ke oni ne povas daŭre regi perforte landon libereman.

Post ĉi tiuj indaj protestoj, la diktatoro, okaze de reĝa festo (17. Majo), liberigis profesoron Jimenez Asúa, ĵurnaliston J. Alvarez del Vayo, kelkajn advokatojn de Katalunlando kaj aliajn, sed publikigis novan *ukazon* dirante, ke de nun li havas rajton puni, tio estas, ke ĉiuj povoj estos ĉe sia mano.

Korespondanto

LNK

Sub tiuj ĉi misteraj literoj sin kaŝas la "brava" organizaĵo de latvaj faŝistoj — la latva naciula klubo. Fondita antaŭ 4 jaroj, ĝi promesis fariĝi vera timigilo por ĉiutendencaj laboristaj partioj kaj organizaĵoj, ankaŭ por alinacianoj, unuavice hebreoj. Junan organizaĵon subtenis ĉiuj supernaciuloj kaj iliaj gazetaĉoj, precipe per laŭdkrioj, ĉar eĉ por la "sankta" nacia afero la burĝo ne tre volonte elpoŝigas sian monujon — li preferas defendi sian patrujon per alies ŝvito kaj sango.

Tamen eĉ tiu aprobo de naciismaj aŭtoritatuloj promesis al novfondita organizaĵo brilan estontecon. Kaj vere — sekvis pompaj festenoj je malfermo de provincaj filioj, standardofestoj k. a., kiujn partoprenis militistoj el caraj bastonemuloj, ekskomunistojprovokistoj, por sia pravigo bojantaj la laboristaron kaj similaj "aŭtoritatuloj", el kiuj konsistis ankaŭ diversŝtupa estraro de "grizĉemizuloj" (la sola distingo de italaj "nigrĉemizuloj"). En tiuj festenoj ne mankis ankaŭ la pastraro, kiu fervore "sanktigis" la standardojn kaj alvokis dian benon sur ekstermontoj de la laborista movado. La vicoj de l' klubanaro mem konsistis el burĝaj buboj, 16—20 jaraj junuloj, forpelitaj el lernejoj, aŭ ankoraŭ lernantaj — por pravigi sian mallertecon per naciula laboro. Senpuneco allogis skandalemajn diboĉemulojn kaj la "sankta" laboro estis komencita. Laboro ja estas la sama en ĉiuj landoj — malhelpo al laboristaj kunvenoj per petardoj, diboĉado. Kaj difektado de elektraj lumfadenoj en kunvenejoj, bomboj en laboristaj gazetredakcioj kaj organizejoj, revolveroj ktp. La kulpuloj ja ĉiam restos "nekonataj", tion prizorgos la "aŭtoritatuloj".

Sed laboristaro tuj organizis kontraŭstaron al minacanta danĝero kaj post mallonga tempo je ĝia dispono estis bone organizita jun-laborista sportularo, kiu akompanas la laboristajn manifestadojn, gardas la ordon dum kunvenoj ktp. Ilian rolon pruvas la fortaj atakoj de l' tuta naciula tendaro, insultanta la sportularon en komunismo kaj aliaj mortpekoj. En Februaro pasintjara, dum disdonado de flugfolioj je magistrataj reelektoj, en Riga surstrate estis mortpafita lab-sportulo k-do Mezak. Kelkaj naciuloj estis arestitaj, unu eĉ kun ĵus elpafita revolvero, sed fine estis liberigitaj pro "nesufiĉaj argumentoj". Tiu-ĉi dolorplena perdo ankoraŭfoje instigis la laboristaron al unuiĝo.

Vidante la organizitan kontraŭstaron, la klubo disfalas en plurajn unuojn, konkurantaj pri monopolo je naciismo — "akropolanoj", ligo de patriotoj k. a., malnovan titolon — LNK — konservas t. n. aktivuloj. Sed la naciisma deliro serĉas eliron kaj oni trovis ĝin alidirekten — subite kaj sinsekve eksplodis bomboj en redakcioj de burĝaj gazetoj — naciista kaj agrarula en Riga kaj agrarula en Jelgava. La naciistaj gazetoj kaj partioj kriis pri komunisma danĝero kaj en eksplodoj kulpigis la laboristaron. Sed esploro de parlamenta komisiono rapide trovis kulpulojn en vicoj de naciuloj mem, kies grupeto estis protektata de luterana pastro... Vere skandaloza afero, kiun la naciuloj mem embarasigas klarigi. La bombulojn oni arestis, sed ĉu la juĝistaro trovos la argumentojn sufiĉajn por akuzo? Dubinde!...

Dume la grizĉemizuloj ardas provoki la lab-sportularon al surstrata kunpuŝo por atingi malpermeson de ilia organizaĵo. Sed la sportularo evitas provokadon, la toleremo de l' laboristaro ankoraŭ estas granda, nur ne forgesu, ke ĝi ne estos senlima — venos la tempo, kiam viaj grizaj ĉemizoj kaj nigraj agoj ne plu hontmakulos la latvan popolon, kiu de jarcentoj estas laborista.

Diogeno.

Trompado de ŝtataj salajruloj en Latvio

Ordinare la parlamentoj antaŭ sia foriro por novaj elektoj fariĝas pli malavaraj. Same ankaŭ pasintjare foririnta latva parlamento destinis 5,5 milionojn da latoj (1 lat. = 1 sv. fr.) por plialtigi salajron de ŝtatoficistoj, precipe de malsuperaj, kies staton la parlamenta plimulto konstatis plibonigindan. La distribuon de destinita sumo parlamento lasis al la registaro.

Kaj registaro dum interparlamenta periodo distribuis la monon laŭ biblia saĝeco, "donu al multhavulo sed de senhavulo forprenu la lastan", — aperis nova prisalajra leĝo, laŭ kiu 3—4 plej superaj kategorioj ricevis plialtigon je kelkobla salajro de malsuperaj, 5—6 mezaj kategorioj je kelkaj latoj, sed restintaj dek malsuperaj kategorioj ricevis nenion, per artifikaj paragrafoj pri longdaŭra aldonpago ili estis eĉ plu trompitaj.

Ĉar la plialtigo estis donita de jarkomenco, la superaj oficistoj ricevis grandajn sumojn, al aliaj registaro lasis "suĉi sian fingron", por malpli senti la malsaton. Sekvis incitplenaj apelaciadoj al registaro kaj parlamentaj partioj, sed neniu atentis la malforte organizitajn ŝtatajn salajrulojn — al pli organizitaj agoj, ja, ili ne estas kapablaj...

Nia oficistaro ĉion atendas de-supre, same ankaŭ ĉi-foje ĝi esperis atingi justecon en novelektita parlamento. Kaj vere, la socialdem. frakcio kelkfoje proponis leĝprojekton pri pli justa salajrigo, sed ĉiufoje ili estas rifuzataj de parlamenta plimulto, pro preteksta monmanko kaj, kvazaŭ, ankoraŭ malaltaj salajroj por superaj oficistoj, kiuj rilatas al malsuperaj kiel 1:10. Estas komparataj salajroj de diversgradaj altranguloj en cara Rusio kun tiuj en Latvio kaj de tiuj komparoj oni konkludas, ke salajroj de superaj oficistoj estas ankoraŭ plialtigendaj, dum la malsuperaj jam kelkoble superas la salajrojn en cara Rusio.

Vere "scienca" argumentado, oni forgesis nur pri du malgravaĵoj: 1. kompari grandan Rusion kaj ĝiaj institucioj kun kelkdekono da ĝi estas iom... aroge kaj, 2. starigi caran salajro-reĝimon kiel modelon por demokratia lando estas iom... nekorekte.

Kaj la ofenditaj ŝtatsalajruloj mem forgesis la grandan veron, ke de-supre ili nenion ĝisatendos kaj sola rimedo por defendi siajn rajtojn estas en unuiĝo, ne sole en apartaj "oficistaj" organizaĵoj, sed unuiĝo kun la tuta laboristaro. *Diogeno.*

ĈIAM TRE ATENTE LEGU LA "OFICIALAN INFORMILON"

(Vidu sur la lastan paĝon)

Proceso de la faŝismo en Francio

Ĵus finiĝis en Parizo grava proceso, pri kiu multe atentis franca proletaro kaj ankaŭ reakciaj rondoj. La 23. Aprilo, lastan jaron, okazis en 18. pariza kvartalo, bataloj inter komunistoj kaj faŝistoj (vidu "Senn." n-o 34). 4 faŝistoj estis mortigitaj kaj pluraj vunditaj. Oni arestis 2 komunistojn, k-doj Clerc kaj Bernardon. La 20. Aprilon malfermiĝis ilia proceso, kiu daŭris du semajnojn. La advokatoj de la akuzitoj uzis 3 taktikojn. 1. pruvi, ke la du akuzitoj estas senkulpaj, 2. pruvi, ke la faŝistoj provokis la laboristan klason, 3. samtempe uzi la okazon por senvualigi la organizadon de la faŝismo en Francio.

Pri la unua punkto, la atestantoj estis tiel diversaj, ke unu kontraŭdiris la alian, kaj eĉ kelkaj kontraŭdiris sin mem. Pro tio oni ne povas aserti, ke la du akuzitoj estis kulpaj. La du aliaj punktoj, tio estas la politika parto de la proceso, estas por ni plej interesaj, ĉar tie oni vidas, kiel faŝismo iom post iom organiziĝas en Francio. La advokatoj de la akuzitoj, (kompartianoj) kunigis ĉiujn agadojn de la faŝistoj de post pli ol unu jaro. Jen kelkaj el tiuj agadoj.

Unu semajnon antaŭ la bataloj pri kiu juĝas la proceso, 500 junaj armitaj burĝoj alvenis ŝarĝaŭtomobile en Sèvres (apud Parizo) kaj perforte forĉasis laboristojn el publika kunveno tie okazanta. La morgaŭon, faŝista ĵurnalo "La Libereco"(?) raportis triumfe pri tiu "patriota mobilizado", kiu plensukcesis (efektive). Alia grava afero estis arestado, ĉe la belga landlimo, de francaj industriestroj, konataj kiel membroj de reakcia asocio; ili kaŝe portis el Belgio militajn pafilojn. Por kiu celo? Cetere, ili ne estis kondamnitaj.

Alian fojon, dum kunveno, policistoj esploris la poŝojn de 35 membroj de reakcia asocio "Franca Agado". Ĉiuj estis armitaj per revolveroj. Mildaj estis la kondamnoj!

Antaŭ kelkaj monatoj, k-do Sadoul, konata membro de kompartio, parolis dum publika kunveno; la junuloj de "Franca Agado" penetris en la ĉambregon, pafis per revolveroj, vundis kelkajn ĉeestantojn kaj fine disrompis ĉion en la kunvenejo.

Pluraj aliaj aferoj estis detale raportitaj de la advokatoj, kiuj tiel pruvis, ke faŝismo estas ja provoko al laborista klaso. —

La gvidanto de la t. n. "patriotaj junularoj", s-ro Taittinger, deputito ĉe la parlamento, parolis ĉe la proceso kiel atestanto. Unu el la advokatoj provis klarigi al li, ke efektive li estas faŝisto, sed li ne volis tion konfesi. Li respondis, "mi ne estas faŝisto, mi estas nacia respublikano-patrioto"! Li ne kuraĝis akcepti la faŝistan titolon, sendube, ĉar ĝi rememorigas pri tro da sango. El la defendant-atestantoj, kiuj parolis kontraŭ faŝismo, ni povas citi Henri Barbusse, Profesoro Langevin, Sèverine, George Pioch kaj multajn aliajn maldekstrulojn, kiuj vigle denuncis la faŝismon, kiel danĝeron kontraŭ la laborista klaso.

Fine, malgraŭ minaco de faŝista gvidanto, kiu skribis en sia ĵurnalo: "se oni ne kondamnos, ni mem faros tion", k-do Bernardon estis senkulpigita, kaj k-do Clerc malliberigata dum 3 jaroj.

Dum la tuta proceso, la prezidanto pruvis ankoraŭfoje, ke homo estas neniam senpartieca, li gvidis la debatojn kiel reakciulo, ĉar sendube tia li estas.

Tiu proceso estis tre utila, ĉar ĝi atentigis la proletojn pri la naskiĝanta franca faŝismo; sed ĝi montris ankaŭ, ke tiu faŝismo ne estas tre grava. Sendube ĝi povas graviĝi, sed tio okazos nur, se dum venontaj krizoj la laboristoj ne kontraŭagos.

Ru. 835.

Lia reĝa moŝto Caro Nikolaj III. — li vivu!

"Caro Samodzierĵavny (memreganto), ĉiopove reganta tutan, nedispartigeblan rusan teron — li vivu por ni! Hurra! Hurra!"

Ĉi, delonge atendita ekkrio fine ekaŭdiĝis en Parizo la 8. Aprilo je Ĝeneral-Nacia Kongreso de Rusaj Emigrantoj.

En pozo je "smirno" bruovacie la kunvenintoj rezoluciis proklami estintan grandan princon Nikolaj Nikolajeviĉ — caro de Rusio.

Do, estas jam Caro Nikolaj III., se ankoraŭ ne sur trono en Kreml aŭ en Petrograda Vintra Palaco — do sur la trono konstruita dume en Parizo de rusaj bankistoj, fabrikistoj, kiujn tedas jam plua diboĉado en parizaj kabaretoj kaj drinkejoj, sopirante je... patrio.

Monarĥismo ne mortas tiel rapide kaj facile. Ja en sama Parizo, kie antaŭ 134 jaroj okazis vere granda festo, kiu faris Parizon dua patrio de ĉiu liberec-movado (ni parolas pri senkapigo de reĝo Ludvik XVI.), en sama Parizo estas nun monarĥisttendaro, havanta sian reganton, sian presorganon, siajn oratorojn kaj eĉ kunulojn.

Ke monarĥismo ne malaperis en Prusio — post forpelo de granda komedianto Vilhelm, ke en Hungario kun eta reĝa krono atendas kun tremo en koro la falsigistoj de 1000 fr. fr. — ankaŭ estas kompreneble.

Vivis do ankaŭ rusa monarĥismo. Estas nur novaĵo, ke kun ĉiuj ĉi ratoj, ĉiuj ĉi aĉuloj, el kiuj konsistas rusa reakci-tendaro, kiu elsuĉadis sangon de rusa popolo dum tiom da centjaroj — tiu ĉi tendaro videble opinias, ke fine alproksimiĝis la tempo por publika proklamo de siaj postulatoj. Certe estas, ke bienuloj, kiel sopirégantoj je sia "sankta tero" laŭ speco de fama Martov III, bankistoj kaj fabrikantoj, kaj profesiaj "vieŝateli" (pendigistoj) laŭ speco de Trepov, sentas, ke vento blovas en ilian direkton. Videble degenerito N.N. ne opinias necesa, resti plu en "neŭtrala rezervo". Je okuloj de tuta Eŭropo li akceptis la kronon el manoj de siaj reĝaj klaŭnoj, "savantaj sian sanktan patrion", kaj dancantaj ĉirkaŭ sia ora bovido...

Ĉar bonvolu nur aŭskulti, kiel fidelregate turnis sin al N. N. rusaj patriotoj, kiuj en la plej grava momento por ilia patrio forkuris, kiel ratoj el dronanta ŝipo al eksterlando kaj venigis kontraŭ Rusio fremdajn armeojn.

"Via Imperiestra Moŝto, la eksterlima kunveno de patriotaj reprezentantoj salutas en Lia Imperiestra Moŝto la portanton de rusa ŝtatideo kaj aŭreoligitan per gloro ĉefestron de rusa militistaro, alvokitan de post unuaj tagoj de suferigaj travivadoj por Rusio al defendo de sankta afero de nia patrio.

La kunveninto estas konvinkita, ke je unua vorto, ke je unua signaldiro de Via Imperiestra Moŝto ĉiuj rusoj senhezite helpos liberigi nian patrion.

Dio ĉiopova inspiru vin en Via laboro por savo kaj revivigo de Rusio.

Respondo de "Lia Imperiestra Moŝto" estis efektive historia.

"Teruraj estas suferoj de rusa nacio, humileco kaj malhonoro de Rusio, persekutado de religio kaj "cerkvo" (preĝejo) grekokatolika. Estus malhonore plue silenti kaj min ŝatas via preteco helpi min savi patrion...

Fidante je helpo de dio ĉiopova — alproksimiĝu la horo de savo de Rusio."

Do sankta triunuo: "Memregado, grekokatolika eklezio kaj nacionalismo".

Meritas tamen atenton unu punkto: degenerita "monarĥo", kiu revas ankoraŭ pri la orfigita trono, jam hodiaŭ piedpuŝis siajn adorantojn per sia soldata botego. Ĉar li ja diris, ke ne estas ilia afero paroli pri estonta sorto de Rusio (tio ĉi ja odorus laŭ parlamentarismo!). Ili devas pensi nur pri "restaŭrigo en Rusio de leĝoregado kaj ordo". Vieŝateli (pendigistoj) neniam ŝanĝas nek siajn plaĉojn, nek sian lingvon — eĉ ti-kiam ruliĝis en ŝangokotejon kronita kapo de lasta Nikolĉjo.

Post la referato de princo Oldenburg oni akceptis alian rezolucion, kiu komencas per jenaj vortoj:

"Sovet-Registaro" reganta nun sur "la *detranĉita* (urezanuoj) *teritorio, kiu apartenas al rusa imperio ktp.*"

Do jam hodiaŭ ne ĝenas ĉi ratoj malkaŝe paroli, ke hodiaŭa Rusio estas tro malgranda, alivorte, ke ĉi novaj ŝtatoj (Polio, Litovio, Finnlando ktp.) devas esti reigitaj sub sceptron de unu "nedividebla" moskva monarĥio.

Post ĉio ĉi restas al ni nur ripeti vortojn de poeto: "Diboĉu, diboĉu aĉuloj!"

Vi ĝisatendos ankoraŭ la grandan feston de tuthomaro kaj per sia dancaĉado kaŭzos senkapigon de lasta kaj vera via povestro — de Ora Bovido!

"Diboĉu, diboĉu aĉuloj!"

J. K. (el Przedjutrze)

Trad. *H. Hola*

INTER NI

La nacieca spiritostato estas tiom profunde enradikiĝinta en ni mem, ke ĝi montriĝas spontane kaj diversmaniere, eĉ ĉe malnovaj SAT-anoj.

Nur unu ekzemplon!

Ne malofte oni povas legi jenan esprimmanieron: "En nia *lando okazis ĉi-tio kaj tio ..." Nu, ĉu tia diro ne estas evidenta signo, ke la skribinto sin konsideras (eble senkonscie) ligita spirite kaj anime al "sia" lando? Se ne estus tiel, li dirus prefere: "En Francio, Turkio aŭ Japanio okazis ktp...", laŭ tio se li loĝas en unu aŭ alia el tiuj landoj.*

— Eble vi pravas, flustras al mia orelo k-do el Moskvo. Tamen ŝajnas, ke rilate Sovetion vi almenaŭ eraras. Ni ja rajtas paroli pri "nia lando", tial ke ĝi estas liberigita el sub la jugo de l' kapitalismo.

— Ni ne disputu pri tiu lasta aserto. Mi nur kredu kaj konsekvence respondu: Se vere Sovetio, la sesono de l' mondo, fariĝis la propraĵo de la tiea laborularo, ĝi do ne povas esti "lando", laŭ la ĝenerale uzata signifo de l' vorto. Ĝi estas Ŝtato al kiu devas senti sin kore ligita ĉiu revoluciulo en la mondo, indiferente, ĉu li loĝas en Lisbono, Pekino aŭ Melburno.

Sekve, ankaŭ vi, moskvano, leningradano k. a. malprave parolas pri via *lando.*

Ni penadu konformigi la vortojn al la realo. Ĉiurilate ni liberiĝu el la nacieca influo. Nur patrioto, naciulo povas logike paroli pri sia *lando. Nenial kaj neniam simile parolu sincera kaj konsekvenca sennaciemulo.* Iuelie

Kooperativismo

La laboristaro tutmonda ĝemas sub la jugo de ĉia privatkapitalista trouzado. Ĝi ege laboras por la liberigo el tiu ĉi ĉeno, provas insiste transigi la privatkapitalistan ekonomiordon al la komuna pere de la organizacioj, kreitaj per ĝi. Ĝi ekkonis, ke nur unueca densarigo de la proletaro tutmonda alproksimigos ĝin al la celo. Kiel gvidanta stelo sur la vojo al la komuneco de la popoloj, al la granda intergefratiga mondfamilio, aperis Esp-o. Nur per ĝi estiĝos la komuneco de la popoloj, kiu tiam celados fincelon.

Sed bedaŭrinde dum tiu ĉi celado oni preskaŭ tute malatentas la plej gravan rimedon, la amasigon de la konsumantoj al la kooperativo. Nur per ĝi la transigo de la ĝisnuna ekonomia ordo al tiu de ni dezirata estas ebla, ne ekzistas alia vojo. Ĉio, kio apartenas al kooperativo, tio estas komuna posedaĵo de tiuj, kiuj estas aĉetantaj anoj. Ju pli da aktivaj anoj, des pli ampleksa la kooperativo, des pli multe da propraj produktejoj. Tiam la profito ne plu fluas en la poŝojn de unuopaj personoj, akciuloj ktp., sed servas al la komuneco. Tiam la ekonomiaj fortoj delokiĝos al nia favoro kaj devigos pli kaj pli la komercistaron kune kun la ofte senlaborema, diboĉema fabrikistaro, ankaŭ labori. Ĉio tio tiam estos direktata al la komuneca mastrumado, kion senpripense nun la konsumanto, kies aĉetoforto kalkulas miliardojn, refluigis en la manojn de siaj ekonomiaj kontraŭuloj. La konsumanto, ni mem estas ĝi, nur havu la volon, utiligi sian konsumforton per firmligita organizaĵo. Tiu estas la irebla vojo, certe kondukanta al nia celo.

Tiun ĉi penson internacie progresadigi, devas esti la tasko de la internacia, precipe esp-ista proletaro, agema por la efektivigo de la komuneca ideo, kies interligiloj estas SAT kaj "Senn.". Grupoj en ĉiuj landoj, serioze diskutu tiun ĉi gravan demandon kaj kunhelpu. Pripensu, ĉu estas pli bone, aĉeti viajn bezonaĵojn ĉe la privata komercisto, do redoni vian penige perlaboritan salajron al la privatkapitalistaro, aŭ ĉu estas pli bone, alporti vian salajron al la kooperativo, kie ĝi laboras por via celo.

Gek-doj el ĉiuj landoj kunhelpu akceli, pritrakti tiun ĉi gravan branĉon de la tutmonda laborista movado en nia interligilo "Senn.". Sendu viajn opiniojn kaj sciigojn pri la kooperativa movado de via lando al SAT-ano 2394. *W. W.*

EKSTER NI

La Redakcio de "Senn." opiniis nenecese konigi al ties legantoj, ke la 18. Aprilo okazis en Varsovio la malkovro de l' Zamenhofa Monumento. Kredeble ĝi havis bonajn motivojn por tio kaj neniel riproĉi mi intencas. Tia riproĉo ja ne estus eŭtrapeleca, ĉu ne?

Sed tamen estas miaopinie sciiginda la fakto, ke okaze de tiu solena ceremonio la memoro je nia Majstro estis grave insultata.

Iu sinjoro (L. K.[1]), li ne forgesis sciigi pri sia titolo en sia diraĵo) en la nomo de Pola Instituto de Esperanto "metis florojn kun nacikoloraj rubandoj kaj priskribis la grandajn meritojn de nia Majstro antaŭ sia patrujo per la disfamigo de Polujo kiel lulilo de Esperanto".

Ĉu do mi troigis, dirante, ke oni insultis al la memoro je la aŭtoro de nia lingvo? Ĉu ne estas insulto, la ago kaj diroj de tiu s-ro (L. K. — ni ne forgesu citi lian titolon — mi ja ne volas ĉagreni lin), kiu malaltigis la grandan verkon de Zamenhof ĝis la fiservado por patriotaj celoj?

Vere ĉe tia konstato mia bonhumoro eŭtrapelisma foriĝas....

Eble estis por eviti al mi tiun malagrablaĵon, ke la Redakcio de nia gazeto silentis pri la okazintaĵo. Se tiel estas, mi do danku pro la intenco. Bedaŭrinde mi devas kontraŭvole legi neŭtralajn gazetojn kaj tiele eksciis pri la insulto farita de patrioto (L. K.) al nia karmemora Majstro.

La ujo por poloj, kie hazarde naskiĝis la genia aŭtoro de l' internacia lingvo, vere famiĝas pli kaj pli, pro la faroj de s-ro Wiesenfeld. L. K., ne forgesu. *Eŭtrapel.*

[1]) Lingva Komitatano.

Stranguloj!

Dum la malferma kunsido de la 15. Germana Esperanto-Kongreso en München salutis la ĉeestintaron en la nomo de la Innsbruck-a samideanaro "samideano", vestita per militistaj vestaĵoj, ornaminta la heroan bruston per diversaj ordenoj kaj flanke portanta sabron. — La kaŭzo: Samtage en München okazis la german-aŭstria kamaradeca tago (militistsence) kaj ĉi-tagon la samideano uzis por veni al München kaj propagandi Esp-on! Nun, Esp-o certe venkos, ĉar la samideano, ĉapon alten tenante vokis: "Vivu Esperanto"! — Esperanto multobligata per militisteco nepre feliĉigos la homaron?! — Ĉu ne strange? — *Rebo 1810*

KRONIKO

Anglio

Londono. La Esperantistaro bonvole notu, ke la Lab. Esp-a Presservo momente *ne funkcias.* I. Glaser ne plu estas responda: Estonte ĉiuj komunikoj estu provizore adresitaj al la sekretario de la klubo mem. W. Chatters, 8, Elgin Terrace Maida Vale, Londono W 9. Esp. artikoloj aperis en Sunday Worker, 1. Majo kaj en Lansbury's Weekly, 1. Majo. *3398*

Aŭstrio

Badena konferenco de ALLE subaŭstria parto. La konferenco okazis la 9. Majo en Baden. Ĝi estis bone vizitata. Ĉeestis ĉ. 150—180 partoprenantoj. La provinco estis sufiĉe reprezentita kaj ni konstatas kun ĝojo, ke la lab. esp. mov. disvastiĝas tie ĉi. Profesoro Simon malfermis la konferencon kaj poste ni estis salutitaj de la badena soc. partio kaj lab. hejma estraro.

La konferenco en tre serioza kaj interesa formo estis aranĝita kaj estis plene da debatoj, kiuj tre interesis la ĉeestantojn. Ni SAT-anoj ankaŭ estis reprezentita de 40%.

Ni en la formo de la konferenco koregе salutis la anglajn strikantajn kamaradojn kaj deziris al ili grandajn sukcesojn.

Pri nia gazeto kaj pri "Senn." estis grandaj debatoj kaj ni SAT-anoj esprimis, ke ni ja ne volas krei ian grandan gazeton per nia "La Socialisto", ĉar ni ja havas nian gazeton "Senn.", kio sufiĉe kontentigas nin, ni nur volas, ke en la gazeto estu la landaj organizaj raportoj kaj iomete la eksterlandaj; ĉar ni povas ĉion legi en "Senn.", kio okazas en la laborista movado.

La konferenco elektis kamaradon Schmidt kiel subaŭstrian reprezentanton.

Ni varbis novajn SAT-anojn, kion vi ja povos poste konstati.

Kun plena kontento finiĝis la konferenco kaj ni marŝis tra la urbeto sub niaj, per verda stelo ornamitaj, ruĝaj standardoj, kaj ekskursis en la ĉirkaŭaĵon de tiu ĉi bela urbeto. *E. B. 6913*

Ĉekoslovakio

Plzen. Laborista Ligo Esperantista en Ĉekoslovakio, centro Plzen, decidis dum sia komitata kunveno sendi al ĉiuj lab. societoj esp. kaj al ĉiuj lab. esp-istoj, kiuj ne estas ĝis nun organizitaj demandilojn, kiamaniere antaŭenpuŝi esp-istan movadon inter lab. en Ĉekoslovakio. Multaj gek-doj estas ankoraŭ en burĝaj societoj kaj ĉefe tiujn-ĉi ni petas, ke ili aniĝu ĉe LLE. Multaj estas ĝis nun neorganizitaj, kio malutilas al nia afero. Ĉiuj gek-doj sciigu siajn adresojn al super nomita "Ligo".

Laborista societo esp. Plzen I aranĝas kursojn por komencantoj kaj progresintoj, entute 60 ĉeestantoj, kiuj deziras korespondadi kun fremdlandaj gek-doj. Gvidanto k-do Peŝek. Societo solenas nunjare 15jaran

ekziston. Okazos solena ĝenerala kunveno, vespereto, granda ekspozicio en kiu estas petataj fremdlandaj societoj prunti esp. propagandaĵojn. Ekspozicio okazos Julion kaj estas eble ĝin viziti al ĉiuj esp-istoj en respubliko. *Peŝek*

Francio

Bourges. Ĝis nun en Bourges lab. klaso estas bone organizata. Oni traktis neniam pri la internacia lingvo, sed iu k-do, loĝanto en Bourges de unu jaro kaj sola lab. esp-isto en tiu urbo konvinkis kelkajn k-dojn pri la grandega utileco de la internacia lingvo por la proletarioj kaj nun oni decidis aranĝi kurson en popoldomo. Sed por gvidi kurson mankis profesoro. Oni faris malmulte da propagando, sed tamen al tiu kurso partoprenas dekunu k-doj, kiuj kune edukas sin, laborante kuraĝe. Mi opinias, ke baldaŭ oni fondos grupon de SAT ĉi tie, kiu certe pli fortiĝos. *SAT-ano 5820*

Cette. La propagandkonferenco, organizata je la 14. 4. 26, de la lab. esp. grupo, tre bone sukcesis.

K-do Salan, SAT-ano, klarigis sukcese la sekvantan temon: Esperanto, internacia lingvo kaj proletariaro.

La kurso daŭradas kaj la Cette'aj laboristoj uzos baldaŭ Esperanton. Jam unu membro de ELG, aliĝis al SAT. Baldaŭ aliaj k-doj aliĝos.

Resume, la konferenco de k-do Salan revigligis la ardon de la k-doj en la Cette'a grupo kaj propagandis sukcese esperanton.

A. C. (6659)

Mouvaux. Nia movado fariĝas vigla en nia malgranda urbeto Mouvaux. En la norda parto de Francio fondiĝis la 16. Majo SAT-rondeto. Ni estas jam 10 membroj kaj ĉiuvendrede okazas kursoj, kiuj estas gvidataj de k-do Veirman. Ĉiu membro faros sian eblon por multe propagandi, ĉu en laborejo ĉu en sia rondo. Por la korespondado kaj por sciigoj skribu al: *Esperanto-servo ĉe Soën*, 130, rue de Tourcoing, *Mouvaux*, Nord-Francio.

Por SAT-rondeto *H. Veirman (5294)*

Saint-Etienne. Nia grupo, unu el la pli malnova de la regiono, ekriĉiĝis kaj fortikiĝis per fermo de kurso, malfermita komenco de pasinta Novembro. Novaj lab. esp. ĉeestas kunvenojn okazantajn ĉiumerkrede je la 20a horo, ĉambro 112, cours Victor-Hugo; entute 14 kamaradoj. Baldaŭ nia kerno interrilatos kun unu grupo ĉiulanda; ĉiuj membroj pensas, ke tiel estos bonega elvivigo. *(126)*

Germanio

Chemnitz. De la 13. ĝis 16. Majo 1926 okazis en Ch. ekspozicio de Kleriga Kartelo Laborista. La ekspozicion partoprenis: Liberpensuloj, stenografistoj, filatelistoj, akvorio-amatoroj, fotograf-amatoroj, Radio-amatoroj kaj multaj aliaj klerigaj specoj el la laborista movado, kaj kompreneble ankaŭ la esperantistoj.

La parto por Esp-o estis tre bone aranĝata: Jam je la komenco staris sur verda piedestalo grandega terglobo 1.90 m., ĉirkaŭita de ruĝa rubando kun surskribo "Esp-o". Sur la terglobo estis Radiosendturo, dissendanta Esp. prezentaĵojn. Tabeloj kaj afiŝoj montris la konstruon de Esp-o. La tuta materialo estis montrata en 6 fakoj, nome:

1. Komerco, interkomunikado, foiroj, turismo ktp. 2. Literaturo, instruiloj, gazetoj ktp. 3. Radio. 4. Korespondado. 5. Esp-o en la servo de la laboristaro. 6. Specialaj fakoj: liberpensuloj, filatelistoj, abstinenculoj, sportuloj, ŝako, militservo-kontraŭuloj, junularo kaj Esp-o ktp.

La ekspozicio estis tre bone vizitata de la laboristaro de Ch. kaj ĉirkaŭaj lokoj, eĉ el malproksimaj lokoj alvenis delegitoj de lab. organizaĵoj, por viziti kaj studi la ekspozicion.

Dimanĉon la 16. Majo, okazis en Ch. ekzamenoj por kursgvidantoj. Partoprenis 10 gek-doj. La ekzamenkomisiono de la Esp-o-Instituto por la Germana Respubliko konsistis el s-ro prof. d-ro. Fritz Wicke, s-ro superinstruisto Oskar Melzer, kaj k-do Franz Leuschner, nomita ekzamenkomisaro de la Esp-o-Instituto antaŭ kelkaj semajnoj. La komisiono ekzamenis ĉiujn fakojn, kaj juĝis juste. Ok el la partoprenintoj sukcesis. Inter ili estas 5 SAT-anoj. K-dino, okupanta sin pri Esp-o nur de post 20 monatoj, ankaŭ bone sukcesis.

Polio

Lublin. Post intertrakto de k-do H. Halpern kun la Estraro de Lublina Profunuiĝo de Metalistoj, tiu ĉi lasta en sia kunsido la 8. Majo konsideris neceson de Esp-o kiel lingvo internacia kaj decidis subteni nian movadon per aranĝo de kurso. Enskribiĝis 15 laboristoj. Inter lernantoj estas ankaŭ unu estrarano, k-do Banaszek. La kurson gvidas k-do H. Halpern.

Kamaradoj kaj esp. lab. organizaĵoj! Por instigi la Estraron de supremenciita profunuiĝo al plua agado en tiu ĉi direkto, bonvolu skribi salutleterojn senpere al: Zarzad Zwiazku Zawodowego Metalowców, Lublin (Polska), Zamojska 10.

RECENZEJO

Libroj

Bukedo 2. volumo. Reviziita de *Zanoni.* Eldonejo: *T. & H. Jung, Horrem bei Köln.* Formato: 12×18 cm, 78 pĝ. Prezo: 0,50 mk. germ.

Tiel nomiĝas libreto, en kiu troviĝas kolekto de 13 literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj de diversnaciaj aŭtoroj. La rakontaĵoj estas interesaj kaj legindaj. Ĝenerale, la enhavo estas bona kaj senerara. *Yerk*

Wörterbuch Esperanto-Deutsch. *D-ro Emil Pfeffer:* Eldonejo: *Tagblatt-Bibliothek, Wien.* Formato: 12×18,5 cm, 46 pĝ., prezo nemontrita.

Ĝi enhavas krom ĉiuj oficialaj vortradikoj (signitaj per steloj) ankaŭ fakesprimojn. Tre laŭdinde estas, krom la oftaj klarigaj aldonoj de *anat. arch., astr.,* ktp. precipe tiuj de *intr.* kaj *tr.* (intransitiva kaj transitiva). Tion tre ofte la esp-istoj ne scias diferencigi. Ĝenerale la libro adaptiĝas al la kutimaj eldonoj, en kiuj mankas la sufiĉaj derivaĵoj. Ĉiam pli sentebliĝas manko de vortaro simila al *Kabe* pli kompletigita. *F. C. R.*

La Panne. Eldonita okaze de la *XV. Kongreso de Belga Ligo Esperantista.* Formato: 12×18½ cm, 8 pĝ., Prezo nemontrita.

La Panne, banloko en Belgio. Ĉi-gvidlibreto en Esperanto kun kelkaj ilustraĵoj, priskribas en mallongaj skizoj la belecojn de la suda parto de belga marbordo. Bona gvidlibreto por tiuj, kiuj havas monon por ripozi je marbordo, bedaŭrinde ni proletoj ne povas viziti ĉi tiujn banlokojn. *Klara*

Internacia Esperanta Stenografio. 1. parto: korespondada skribo, 2. parto: raportista skribo. Hektografitaj lernolibroj. Formato: 10×16 cm. Prezo: 2 fr. svis. Havebla de la aŭtoro: *S-ro Dyba, Berlin-Niederschönhausen,* Moltkestr. 4.

Paroli pri valoro de stenografio ne estas necese. Sufiĉas diri, ke ĉi tiu sistemo estas facile lernebla. Sur konciza loko la verkinto donas la necesajn klarigojn. Granda aro da sigeloj ebligas ŝpari multe da tempo kaj loko. *Yerk*

Gazetoj

Represis el "Senn.": "*Arbeiter-Zeitung,* Frankfurt a. M., n-o 88, 16. 4. 26: "Novaj triumfoj de Esp." "Esp. kaj la finnlanda registaro" IR ("Senn." 81). "*La Dogumentation Catholique*", Paris, n-o 30, 30. 1. 26: "La sindikatmovado tutmonda" ("Senn." 62). "*Väst Svenska Ku-*

Pri persa revolucio 1908—1910

En mezo de Kazvin troviĝas malgranda citadelo, kiu estis restadejo de guberniestro, kie staris ĉirkaŭ 500 sarbazoj (piedregimentoj pafistaj). La urbo mem estas ĉirkaŭata per ŝtonmuro kun kvar pordegoj; ĉiu flanko havis unu pordegon. Sur la ŝoseo de Rescht en distanco de Kazvin 8—10 kilometrojn precize same kiel en bieno Sultan-Abad, staris militrajdantoj, ĉirkaŭ 300 personoj, kiuj atendis alveturadon de Revkom. Proksime de Kazvin Revkomrajdantoj partiĝis en kvar grupetoj kaj samtempe tra ĉiuj pordegoj enveturis en urbon. Kaŭzata de tio senorda aerpafado kaj granda tumulto per tio same terurigis tutan loĝantaron. De flanko de Rescht speciale moviĝis ĉirkaŭ 80 rajdantoj, kiuj detenis atentajn gardistojn, kaj okupis per pafado. Dum tiu tempo la rajdantoj komencis senarmigi la gardistojn kaj solajn sarbazojn kaj pafilojn transdonadis al aliuloj dezirantaj partopreni kaj helpi al Revkom. Multe da tempo estis uzita por la batalpreno de guberniestra restadejo, ĉar enpenetri tien estis tro malfacile, tial ke ĉiuj eniroj estis baritaj kaj garditaj de sarbazoj. La muron oni trabatis per la bomboj kaj grenadoj kaj en trabatitajn truojn oni devenigis per pafado sarbazojn, kiuj estis tie starigitaj kiel gardistoj. Tiel forta estis pafado, ke trunkoj de pafiloj tro varmegiĝis kaj bezonis malvarmigi ĝin per malvarma akvo. Kaj nur kiam oni traboris en muro pli grandan truon oni komencis pli forĵeti la bombojn kaj ekbruligi la konstruaĵon en la citadelo. La sarbazoj ekvidis, ke ĝi nenie ricevadis helpon de siaj militrajdantoj, forĵetinte la pafilojn kaj surligis sur la stangoj blankajn tukpecojn leviĝinte siajn manojn ekkriis "Zendabad-muĝehid" (vivu revoluciuloj). Nur kiam oni estis preninta la restadejon de guberniestro, la revoluciuloj rapide returnis al siaj rajdantoj, kiuj daŭrigis interpafadon kun la militrajdantoj de administraro en distanco 6—8 kilometroj de Kazvin al Rescht. Pro proksimiĝo de revoluciuloj al Kazvin la regimentoj de administraro tuj ĉesis sian bataladon kontraŭ la revoluciuloj kaj retrodonis siajn armilojn. Per tia maniero estis farita ekokupo de Kazvin.

Dum sekvanta tago ekokupo de Kazvin el Rescht alvenis ĉefstabo de revoluciuloj kun ĉefkamarado Efrem kaj riĉulo Sapeĥder.

IV. La okupo de Teherano

Post la starigo de revolucio, reĝimo en la Kazvin kaj Endjumenon (municipaliteto), juĝej- kaj militistorganoj (Mahlie-, Nazmie) oni instruis memvolajn amasojn da homoj, kiuj deziris helpi al Revkomo por urĝa alveno al Teherano. En Teherano estis armeo de la Mohamed-Ali Ŝah sub la komando de generalo Ljahov taĉmento de kozakoj (2000 personoj) kaj aliaj kun kanonoj. Je la distanco 100 km laŭ vojo de Teherano al Kazvin en urbo Kereĝo disvastiĝis armeo de Ŝah kaj gard-

riren", Göteborg, n-o 6: "Dekadenco de la germ. kapitalismo" ("Senn." 16); n-o 9: "La vivo inter la soldatoj en Ĉekoslovakio" ("Senn." 21); n-o 10: "Kion aŭdu ĉiu proleto" ("Senn." 19); n-o 13: "Mizero de infanoj" ("Senn." 19); n-o 15: "La pola registaro nutras la senlaborulojn per grenadoj" ("Senn." 20). "*Ruhr-Echo*", Essen, n-o 89, 17. 3. 26: "Alvoko al la kom. junularo" ("Senn."). "*El Socialista*", Madrid, n-o 5, 381, 4. 5. 26: "Notoj pri la sesa SAT-Kongreso" (F. Azorin) el "Sennaciulo". "*Signalen*", *Stockholm,* gazeto por fervojistoj enhavas ĉiunumere Esp.-angulon, gvidata de la asesoro de IAEF., k-do parlamentano Ernst Eriksson. En la du lastaj numeroj ni trovis tradukaĵojn el "Senn.", nome en n-o 17, 29. 4. el "Senn." n-o 29, art. "Esp-o kaj finnlanda registaro", kaj en n-o 18, 6. 5., art. el "Senn." n-o 27, "Konsekvencoj".

Represis el "S. R.": "*La Revista Bianca*": "La batalo inter la marksismo kaj anarkismo dum la rusa revolucio!" ("S. R.", Junio 1924). "*De Tribune*", Amstel, Holando, n-oj 161, 162, 163, 164, 165, de 10., 12., 13., 14. kaj 15. Aprilo 1926: "Festo de laboro kaj paco" de Izgur el "S. R.", 19—20, Aŭg.-Sept. 1924.

Represis el div. gazetoj: "*The Record*", London, n-o 57: "A Step. Forward!" (Paŝon antaŭen). "*Lansbury's Labour Weekly*", Lansbury, 1. 5. 26: "Internaciaj pensoj je la Majfesto!" "*Sunday Worker*", 2. 5. 26: "What is SAT?" (Kio estas SAT?). "*Int. Transportarbeiter-Föderation,* Amsterdam: "Esp-o kaj scienco! Esp-o kaj la preso! Esp-o kaj la foiroj! Esp-o kaj Radio! Esp-o kaj la laborista klaso!" "*Signalen,* Stockholm, 15. 3. 26: "Artikolo pri Esp-o kaj SAT". "*Revista Popular*", Cordoba, 15. 4. 26: "Pablo Iglesias".

SAT-rondo Essen pri la Esperanto-Fibel.
En ĉiuj kursoj de la SAT-anoj de Essen oni instruas laŭ "Petro", per kiu la kursanoj sufiĉe sciiĝas pri SAT kaj ĝiaj celoj. La Esp-Fibel estas nur preparilo, por ŝpari la multajn klarigojn, kiuj komence estas necesaj por instrui laŭ "Petro".

En la nomo de la SAT-rondo Essen
J. Burger (601).

VARBU ABONANTOJN POR SENNACIULO POR PLI FIRMIGI ĜIAN EKZISTON

Blinduloj

"Baldaŭ veturas Sovet-Union la redaktoro de madrida ĵurnalo "Blinduloj" — Antonio Gervas, por raporti pri organizado de Internacia Asocio de Blinduloj. Antaŭ ne longe li jam faris raporton pri tiu-ĉi temo en Parizo.

Kiel konate, internacia lingvo Esperanto trovis jam multegajn adeptojn inter blinduloj. Tial Esperanto povas doni konkretan gravan utilon al Blindulinternacio. Ĉe SAT kiel eble plej rapide ni devas organizi Blindulsekcion, kaj tiu sekcio senprokraste devas proponi al k-do A. Gervas siajn praktikajn servojn. Niaj madridaj k-doj tuj devas atentigi A. Gervas pri SAT.

H. Frank, Leningrad

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L — letero. PK — poŝtkarto. PI — poŝtkartoj ilustritaj. PM — poŝtmarkoj. bfl. — poŝtmarko sur bildflanko. k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj. espaĵo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio

— K-do *Karolo Wiedemann,* Quellenstr. 136/36, *Wien, X,* dez. interŝ. belegajn PI de urbvidindaĵoj k. ĉ. l. Resp. honeste garantiata.

Ĉinio

— K-do *Sij Hsuhenjao,* The Chinese Student department, Tun Wen College, *Shanghai,* dez. koresp. pri socia vivo k. lab. movado de ĉ. l. Resp. nur al seriozaj korespondantoj.

Germanio

— Lab. Esp. Grupo "*Unueco*" Somerau, dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l., L, PI, Esp-gaz. Ĉiam resp. Adr.: K-do *Otto Michel, Sommerau n-o 30, b. Reibersdorf i. S.*

— Esp. Sekcio inter "La Naturamikoj" dez. koresp. k. ĉ. l. Adr.: *Felix Hans,* Hauptstr. 6, *Glauchau-Rothenbach i. S.*

— 15 gelernantoj dez. kor. k. ĉ. l. L, PK, PI. Skribu tre legeble! Adr.: K-do *Karl Reichelt, Pirna-Neudorf* n-o 36.

Japanio

— K-do *Masa Mizutani ĉe Rjokuĵin-Ŝa,* P. O. Kesto, 14, *Kamata-Tokio,* pri kom. movado, L, PK, PM, PI, bfl. k. ĉ. l.

Sovet-Unio

— **Adresŝanĝo:** Gek-doj Kazina Olga, 3569, kaj Heeger Theo, 1180, petas iliajn gekorespondantojn skribi laŭ jena adreso: *Samar-Zlat. ĵ. d. St. Samara* Otdel Prosveŝĉenija ĵ. d. Det.-Trud.-Kolonija Juravlevka.

— *Centra Komunista Klubo en la nomo de K. Marks,* ul. Engelsa, 30, *Minsk,* dez. koresp. kun eksterl. kom-istoj; proletaj, sportaj, belartaj, virinaj, junulaj, sendiulaj, ŝakludaj k. a. org-aĵoj k. kluboj. Ankaŭ kun opaj k-doj el ĉ. l. Interŝ. gaz., ĵurnaloj, fotoj, nacikomunist-eldonaĵoj ktp. Nepre skribu! Akurate resp.

— Por serioze amikiĝi ni serĉas korespondantinojn. Resp. al ĉiuj alsendintoj de bela poeziaĵo. Ĉeestos SAT-kongreson en Leningrad. Adr.: *F. Zaĥarov* (Stazo), str. Ĉerniŝevskogo, 137, *Saratov.*

— K-do *Nikolo Graĉov,* Sokovskaja, 11, *Iv-Voznesensk,* pri ĉ. temoj, L, PK, PI, k. ĉ. l.

— "*Rondeto Esperantista*" dez. koresp. k. ĉ. l. pri div. temoj. *Stavropol, Kaŭkazo, Meĵsojuznij klub.*

— K-do *Tretjakov, S.,* Jamki N. 37, *Voroneĵ,* dez. interŝ. L, PK, PI, k. kor. pri div. temoj k. ĉ. l. Resp. garantiata.

Usono

— K-do *K. A. Susuki, Orange,* Texas, dez. koresp. per PI, k. ĉ. l. Certe resp.

---

adis la vojon al Teherano. Dum la periodo aprilo-aŭgusto la revkomo organizis la taĉmenton kaj eliris el Kazvin al Teherano. Renkontiĝinte la kozakojn apud Kereĝo la Revkomo dum la tri—kvar antaŭaj tagoj havis malsukceson, ĉar kozakoj havis fortikaĵojn kaj sidis en tiu loko de kelkaj tagoj, sed kiam Revkomo reorganizis siajn amasojn kaj faris kelkajn strategpaŝojn tiam kozakoj estis devigitaj cedi siajn lokojn al Revkomo kaj forkuri al Teherano. Dum sia restado Revkomo en Kereĝo organizis sian administracion, starigis la munipaliteton kaj denove varbadis memvolajn personojn por taĉmento. Post la daŭra batalado apud Teherano, Revkomo sukcesis bone kaj okupis Teheranon, kaj la despotismo de Mahomed Ali Ŝah estis disfaligita, bedaŭrinde, ke ne por ĉiam.

Post la repreno, en Teherano ankaŭ stariĝis Medĵlison (parlamento) kaj el membroj de Revkomo kaj Medĵliso estis elektita la provizora registaro, kaj Mahomed Ali ŝahon eksigis kaj forveturigis al Odessa (Rusio). Ĉefa administranto estis administranto de filo de Mohamed Ali Ŝah — nuna ŝaho Aĥmedo — kiu havis tiam nur 9—10 jarojn. Post la venko al kozakoj ĉiuj oficiroj estis liberigitaj (bedaŭrinde) kaj kolektiĝis diversaj bandaĉoj, kiuj organizadis iom post iom kontr-revoluciajn taĉmentojn. La bien-posedantoj, kiuj antaŭe amasigis sin al Revkomo, denove komencis faradi fiagojn kaj perfidadis por utilo de kontr-revoluciuloj. Estro de militaĉmentoj, k-do Efrem, devis batali kun ĉiuj bandaĉoj en aliaj lokoj en urboj Hamadan Kumkermanŝaĥ dum du jaroj sen ripozo.

V. La sufoko de revolucio

Fiagoj de provokisto, estinta cara generala konsulo de Giljano s-ro Nekrasov estis organizinta kelkajn perfidbatalojn kun revolucigardistoj rusaj kozakoj, ĉar cara reĝimo kaj ĝiaj servistoj estis malkontentaj pri sukcesoj de revoluciuloj ĉefuloj, kiuj estis elmigrintaj rusoj revoluciuloj de militvaporŝipo "Potemkin" kaj aliaj. S-ro Nekrasov elvokis el Rusio militamasajn taĉmentojn sub la komandanto de generalo Dovbormusnickij. Kiam aperis duon-sovaĝaj pied-kozakoj en Recht kaj Kazvin pafistaj regimento de "Salijanskij" la Revkom organoj estis devigitaj kaŝiĝi, ĉar la rusaj elmigrintoj estis persekutataj, ekkaptitaj kaj malliberigataj, sekve organizaĵojn oni senkapigis, kaj dispecigis ĉiujn taĉmentojn. Kaj tial iom post iom oni sufokis la unuan persan revolucion. K-do Efrem dum la batalo apud la Hamadano mortis per perfida kuglo. Je la komenco de la jaro 1912 en Recht la konsulo Nekrasov pendigis kvar personojn el ĉefoj de organizantoj de persa revolucio, kiel lastaj fidelaj kamaradoj. Pri aranĝo de eŝafodo multe helpis servisto de konsulo Nekrasov, iu Saprikin estinta kozako, skribisto, kiu ĝis nun sukcese vivas en Recht.

SAT-ano.

Sennacieca Asocio Tutmonda

Asocia Sidejo: 23 Rue Boyer, Paris-XXe
Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27 — poŝtĉeka n-ro 6835
Celo: *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

OFICIALA INFORMILO

EKZEKUTIVA KOMISIONO

De nun, oni adresu ĉion, kio koncernas E. K. kaj D. K. al

K-do Glodeau, 23 rue Boyer, Paris XX

la poŝtmandatojn, ĉekojn ktp. oni tekstu ankaŭ je tiu nomo kaj adreso.

Antaŭ kelka tempo ni eksciis, ke iu "SAT-rondo" eldonis nacilingvan lernolibron. Samtempe venis al ni riproĉoj rilate tiun faron. La riproĉintoj preskaŭ kulpigas la gvidantaron de SAT pro tia mispaŝo. Necesas do, unu fojon por ĉiam, deklari tute malkaŝe, ke neniam ni subtenis tian entreprenon. Male ni ĉiam alvokis por fakigo de la laboro kaj koncentrigo de la fortoj. Tiucele ni klopodis apliki tiun principon en la organizado de la laboristaj samlingvanoj laŭ tutmonda skalo.

Sekve de tio estas memkrompreneble, ke sur nacilingva skalo la koncentrigo de fortoj estas same alcelenda. Konsekvence neniu rondo rajtas sin apogi sur la gvidprincipojn kaj pasintan agadon de SAT por iel ajn, ial ajn konkurenci iun ajn nacilingvan por-esperantan organizon.

Se k-doj malkontentas kontraŭ la gvidadon de sia naci-lingva organizo, ili luktu en ĝi por ŝanĝi tiun gvidadon; sed ili ne provu fari, sub la ŝirmo de SAT, disigan laboron.

Plue, aldonende estas, ke *laŭstatute* ne ekzistas "SAT-rondoj".

Tamen tiaj rondoj povas esti tre utilaj tie, kie la plimulto da anoj de la loka grupo ne konsistas el SAT-anoj. En tiaj grupoj, niaj membroj devas labori kvazaŭ frakcie, ĝis la grupo en sia granda plimulto aprobas la vidpunkton de SAT kaj sekve SAT-aniĝas.

En la funkciado de loka grupo la fakismo ankaŭ estas aplikenda. Estas plej trafe, se funkcias paralele kaj interhelpante, la *por*-esp-a kaj *per*-esp-a aparatoj. Povas ja okazi, ke la du aparatojn funkciigas la samaj k-doj, tie, kie la grupo ne havas sufiĉe da laboremaj aŭ laborkapablaj anoj. Sed tio ne signifas, ke ambaŭ aparatoj ne estas bezonaj.

La ĉiutaga vivo instruas, ke ju pli oni aplikas la fakismon, des pli prosperas entrepreno. Necesas ja difini al ĉiu fako propran taskon kaj atenti, ke unu ne uzurpu alian. Koncerne la esp-an movadon estus tute sensence, kvazaŭ hereze, se SAT, kies anoj estas disaj en ĉiuj mondpartoj, okupiĝus pri nacilingva propagando de esp-o; same sensence kaj hereze estas, kiam nacilingva organizo eldonas verkojn mondskale uzeblajn.

Necesis rediri tiujn elementajn verojn, ĉar kelkiuj forgesis aŭ ne komprenis ilin.

Kelkaj k-doj petis, ke ni sciigu pri la kaŭzoj, kiuj igis la EKon decidi, ke ĉio, de nun, devas esti adresata al k-do Glodeau. Ni ne povas respondi publike tiun demandon, sed estas pretaj liveri letere la deziratajn klarigojn al ĉiu respondeca kolektivo.

Almenaŭ ĉiu eksciu, ke la konsisto de EK ne sanĝiĝis, kaj ke ĝiaj membroj laboras en plena interkonsento.

De multaj flankoj ni ricevis demandojn pri k-do Fanta (Rumanio), kiu senĉese superŝutas SAT-anojn per monpetoj. Ni devas averti, ke Fanta ne plu estas membro de SAT. Ni ne aldonos pluan vorton. Ĉiu petato respondu al la petanto laŭ sia bontrovo. *Ekzekutiva Komitato de SAT.*

KORESPONDEJO

4134. Rilate la nomdonan riton en Saratov jam aperis respondo en „Senn." n-o 34.

3675. Ni ne presigas vian manuskripton, ĉar ĝi rezultigas la saman, kion deziras la k-do en sia art. "Senn." 34 (86) pĝ. 5.

6358. Via manuskripto estos uzata en okazo de bezono.

2985. Pro tro da alia pli grava materialo ni devas prokrasti vian materialon kaj uzos ĝin nur en okazo de bezono.

J. Esperanto — Via manuskripto estas tute malklara.

KARAVANO DE LONDONO AL LENINGRADO

SAT-ano J. W. Sons, delegito de la Lab. Esperanto-Klubo Londono, kun la aprobo de la komitato de BLES (Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj) aranĝas karavanon al la VI. Kongreso de SAT Londono—Leningrado. Ĉiuj, kiuj deziras partopreni, skribu senprokraste al: **2. MACCLESFIELD ST., LONDON W. 1 (Angl.)**

La plej malkaraj! Por germanlingvanoj La plej popularaj!

Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj
de D-ro Emil Pfeffer

Jus aperis:

Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Enhavas ĉiujn de la Akademio akceptitajn vortradikojn kiel ankaŭ la plej komun-uzajn fakesprimojn. (En preso.)

Pli frue aperis:

Esperanto in 10 Unterrichtsstunden. Elparolado, gramatiko, ekzercoj, poemoj, traduk-ŝlosilo ktp. Por meminstruo kaj kursoj. 6a ĝis 10a milo.

Erstes Esperanto-Lesebuch für Anfänger und Kurse. Elektita prozo kaj poezio **kun laŭvorta germana interlinia traduko** kiel ankaŭ lingvaj k. literaturaj klarigoj. — La ĝisnuna pena serĉado en vortaroj estas al komencantoj ŝparita!

En preso:

Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Ĉirkaŭ 100 paĝoj da dense presita teksto kun pli ol 12000 germanaj vortoj kaj 20000 tradukoj. Duobla volumeto; aperos fine de majo 1926.

La kolekto estas daŭrigota. Prezo por 48-paĝa volumeto 25 Pf., 2 kĉ., 40 groŝoj aŭst.

Tagblatt-Bibliothek Wien I, Fleischmarkt 5

Esperantistaj liberpensuloj!

Subtenu la batalon kontraŭ la marŝanta mondreakcio kaj aliĝu al

Internacia Ligo de Liberpensuloj

Ĉiu membro ricevas senpage la oficialan gazeton Liberpensulo kaj havas la rajton publikigi trilinian anoncon dum jaro tute senpage. Jarkotizo 1926 minimume 2 mk. g. aŭ sama voloro. Mendu ĉe: Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22, Poŝtĉeka numero 43 808, Leipzig.

SAT-INSIGNOJ

Prezo 0,80 mk. g.



Prezo 0,60 mk. g.

Rich. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstr. 1

Eldona Fako Kooperativa de SAT



BALDAŬ APEROS

ETIKO

ĉ. 240 PAĜA

VERKO DE KROPOTKIN

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG